PRINCETON UNIVERSITY
SEP 1921
THE LIBRARY

# AMERIKA ESPERANTISTO

SEPTEMBER, 1921

OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular $1.00: Contributing $3.00: Sustaining $10.00; Life Members $100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.

**BERKELEY, CALIF.**
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

**OAKLAND, CALIF.**
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

**SAN FRANCISCO, CALIF.**
San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St.

Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

**MONTREAL, CANADA.**
Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

**TORONTO, CANADA.**
The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec.,E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

**WASHINGTON, D. C.**
La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

**CHICAGO ILLS.**
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

**BOSTON, MASS.**
Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

**WORCESTER, MASS.**
Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

**PORTLAND, ME.**
Portland Esperanto Society. Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

**DETROIT, MICH.**
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

**HEBRON, NEBRASKA.**
La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Ĵaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

**HOBOKEN, N. J.**
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

**NEW YORK CITY, N. Y.**
The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

**CLEVELAND, OHIO.**
La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

**ERIE, PA.**
La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, inĝ., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono $1.00.

**PHILADELPHIA, PA.**
Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo., Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

**PITTSBURGH, PA.**
Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

**MILWAUKEE, WISC.**
Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

**WEST NEWTON 65, MASS.**

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

One Dollar a Year. Single Number 10 Cents.
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

**Published Monthly by**
**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**
The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 28. Sept., 1921. No. 5.

## AL LA SAMIDEANARO

The wonderful progress made by Esperanto in most of the European countries during the last two or three years is no doubt due, among other causes, to the excellent Esperanto organizations of those lands. In comparison with this progress the territory over which the E. A. of N. A. aims to carry on its propaganda has shown very little return for the efforts made in the past. The initiatory work of the officers and members of the E. A. N. A. was a pioneer endeavor, but the trail has been well blazed by them; let the present and future members extend and widen it so that the Esperanto movement of the continent of North America may in a measure keep pace with the march of Esperanto activities in the lands of other continents.

### HOW CAN THIS BEST BE DONE?

The officers and members of the E. A. N. A. at the Congress held in Boston, July 12-16th, 1921, unanimously arrived at the opinion that our future lies in the direction of associated effort and individual enthusiasm. The time is ripe for effective work and the association looks to closer relations with all Esperantists, be they in groups or as individuals isolated in small towns where the Esperanto ideals have not yet been implanted.

We need, first of all, a stronger association, which means a larger membership. Having an association that will be able to reach the length and breadth of our territory, we shall be able to give greater support to the individual's propaganda effort. In the meanwhile we now need your individual sympathy and help, gesamideanoj of all the States of Mexico and Usono and the Provinces of Canada.

Digitized by Google

## HOW CAN YOU HELP THE ASSOCIATION AND THEREBY THE CAUSE WE ALL FEEL STANDS ON THE THRESHOLD OF SUCCESS?

Again on this point the congress deliberations have but one message to give. Each Esperantist should become a member of the Association and a subscriber to Amerika Esperantisto. What great things might be done if during the coming year we could double the membership of the Association and the subscription list of the journal! Indeed, in such an event we could quadruple our efforts and our propaganda would be enhanced proportionately.

Granted that the preceding paragraphs express our aims and our needs, the machinery may be said to exist in our by-laws ready for action, and it but remains for all Esperantists to set it in motion. According to these by-laws autonomous sections can be formed and linked to the central body, upon the request of any number of Esperantists, in any particular section of the Union or Province of Canada. But it is now time, the E. A. N. A. thinks, to **request** you whether as groups or as individuals to get in touch with the Executive Committee of the Association for the immediate furtherance of our activities. No doubt if the Association succeeds in getting groups and individuals to entertain our plan, we shall presently have a clearer concept of the weakness and the strength of the movement in the different parts of our propaganda field, and by a system of "Delegitoj"—probably similar to those of the U. E. A.—be able to advance Esperanto as never before experienced on this continent. In short, we want volunteers to undertake the initiatory steps, volunteers who will offer themselves in this preliminary co-operative endeavor to bring to the "centra oficejo" the necessary data upon which to base a more efficient, active and vigorous body, commensurate with the call of the hour.

Come then, Gesamideanoj, let the Executive Committee, or some officer of the Association hear from you relative to the immediate needs of your locality, and in so far as our present resources may permit, let us help one the other in the furtherance of the movement.

The material needs of our association—your association, if you will—are many, but by inducing others to link themselves with us, we shall each of us contribute materially to the final triumph of Esperanto on the continent of North America.

The maintenance of the Association and the journal falls rather heavily upon the few; let your co-operation, therefore, not only lighten the burden but at the same time strengthen the cause.

Devizo nia estu:—Unuanime kuraĝe antaŭen!

G. W. Lee, Sec.

---

"Ĉu vi al mi permesos vin nomi per la unua nomo?" demandis la junulo. "Ho, jes," respondis la junulino, "mi permesos al vi min nomi per via lasta nomo."—Yale Record. —Bopomano

Digitized by Google

## AL USONO!

### LA PROFETA PAROLO DE PI Y MARGALL

"Mi min turnas al ci, Norda Respubliko, de nacio kiu cin ofendas kaj malamas tial ke cin konsideras kunkulpa je la ribelado de Kubo. Se rilate Kubo pri io mi devus cin kulpigi, tio estus tial ke ci cin kondutis tro senkuraĝa kaj sendecida. Ci cin liberigis el jugo de Anglujo, parte per cia penado, parte per helpo de Francujo kaj Hispanujo; ci ne povas rigardi indiferente koloniojn kiuj celas batalante sendependon. Ci devas uzi favore je ili cian influon kaj cian spadon pli prave ol por ci faris malproksimaj nacioj de Eŭropo.

La humila verko, kiun mi dediĉas al ci, celas precipe fari cin nacio liberiganta gentojn. Mi ne trovis inter la nacioj de l' mondo alian plej bone plenumonta tiel grandan taskon kaj en cin mi metis mian rigardon, kiu estas tre laca tial ke ĝi vidadas triumfantan maljustecon: ni havas ĉi tie, ĉe Eŭropo, la gloran Svisujon, kiu malamas la propran kaj fremdan servuton; sed ĝi estas respubliko, kiu, pro sia situacio kaj povo, tro sufiĉe faras sin defendante kontraŭ la najbaraj nacioj.

Eble ci miros tial ke mi parolas al ci uzi perfortecon. Mi malamas la militon, sed mi pli malamas la tiranecon. Mi akceptas forton kontraŭ la tiraneco, kaj eĉ mi aplaŭdas kaj sanktigas la forton tiuokaze. Je la honoro de Aleksandroj kaj Cesaroj, neniam mi kantos laŭdojn; mi ilin kantas je la honoro de homoj kiel Washington kaj Bolivar. Neniam mi konsentis pri rajtoj pro almilito, kaj ĉiam mi konsciis pri la rajto de la almilititaj forĵeti per la armiloj la invadinton kaj perfortmastrumanton kvankam la okupado de la lando venus de jarcentoj kaj la perfortmastrumanto estus pliboniginta kaj civilizinta la perfortmastrumaton. Ĉiu popolo ribelanta por atingi sian perditan sendependon meritas mian respekton kaj amon de la unua momento; mian admiron kaj entuziasmon kiam mi vidas ĝin batali tagon post tago kontraŭ superaj fortoj kaj fine triumfi. Inda, tre inda je mia opinio estas tia popolo.

Aliaj estas la sentoj hodiaŭ regantaj; sed mi metas pli alten tiun de homaranismo ol tiun de patrujamo kaj mi ne konsideras esti patrujama defendi mian patrujon por konservi gentojn perfortsubmetitajn. Mi volas la popolojn plenliberaj kaj ligitaj de reciproka amo kaj de komunaj interesoj.

Ci, Usono, povas fari multe por alproksimigi ĉi tiun idealon malproksiman; tial mi min turnas al ci kaj miajn fidon kaj esperon mi metas en cin.

En Eŭropo nur estas popoloj perfortpremantaj. Estu ci la popolo liberiganta, Respubliko de Washington. Ci estas nun la unua nacio de l' mondo. Ci enloĝigas ĉe cia teritorio la tutan homaron: pli ol ok milionoj el Eŭropanoj, pli ol sep milionoj el Afrikanoj, pli ol centmil el Ĥinoj, pli ol du milionoj el civitanoj de la ceteraj Respublikoj de Ameriko. Ĉe ci serĉas rifuĝejon ĉiuj kiujn suferigas la tiraneco kaj la homo.

Ci havas templojn por ĉiaj religioj. Ci ne starigas diferencojn inter kristanoj kaj protestantoj, inter protestantoj kaj judoj, inter

Digitized by Google

judoj kaj budhanoj, k. c. Ci permesas ĉiajn kultojn kaj neniun ci oficialigis, neniun ci pagas.

Ci estas la libereco, la demokratio. Ci defendas la personecon de ĉiuj kiuj alkuras al cia protekto; ci estis la unua skribinta la sanktajn kaj eternajn rajtojn de la homo. Je 1776, 13 jarojn antaŭ la Franca Revolucio, ci ilin proklamis per la Konvencio de Virginia. Ci ankaŭ estis la unua malaperiginta la sklavecon de la negroj. Anglujo nur estis malpermesinta la traton; ci per sola decido liberigis ĉiujn sklavojn kaj ĉi tio kostis al ci milito kaj oferi unu el ciaj plej bonaj civitanoj; sed ci venkis kaj malebligis en la cetero de Ameriko la servuton.

Ci ne nur respektas la rajtojn de la civitanoj, sed ankaŭ tiujn de ciaj diversaj gentoj. Ci sciis efektivigi en cia organizo la savantan principon pri unueco en varieco, kaj ci povas, aplikante kaj disvastigante cian sistemon, unuigi ĉiujn naciojn de la tero, kaj fari la homaron ronda familio.

Kiu havas pli ol ci titolojn kaj rimedojn por esti la flagportanto de la homaro? Ci estas povega; havu kuraĝon kaj ne estos nacio, kiu lasos nek lasis por la Historio pli brilantajn paĝojn ol la ciajn. La estontaj generacioj konsideros cin liberiginta la popolojn, liberiginta la gentojn."

—Esperantigis el hispana lingvo
Julio Mangada Rosenorn
Direktoro de "Hispana Esperantisto."

Rimarkigo de la tradukinto:

Kiel antaŭvidis la fama respublikano hispana tiel okazis, ĉar dank' al Usono eŭropaj popoloj ne perdis la liberecon, kaj ankaŭ de tiu lando venis al ni doktrinon por ke oni ne povu celi iam tian pretendon. Iam, en Orense, alia glora respublikano hispana, Emilio Castelar, per parolado, vidigis la tragikan hombuĉadon pasintan; dezirinde estas, ke nur efektiviĝos la antaŭdiron de la unua, por ke tiu de la dua ne ripetiĝos plu.

---

## PREDIKETO

"Venu kaj vidu." Johano 1:46.

En la nuna tempo estas nesaĝa persono kiu kuraĝos diri ke io estas neebla. La elpensintoj jam faris tro neeblaĵojn, kaj tio kion unufoje neniu povis fari nun estas preskaŭ banalaĵo. Antaŭ nelonge se oni similigus malfacilan aferon kun io multe preter homaj povoj, ofte oni dirus: "Iu tiel facile flugus. " Nun, tamen, la flugado de homoj estas tiel komuna ke ne malofte la br-r-r-r de la aera maŝino ŝtelvenas en niajn orelojn sen ke ni suprenrigardas por trovi la kaŭzon. La tempo mankus al ni eĉ por elnomi la fizikajn miraklojn kiujn la elpensintoj kaj iliaj disĉiploj faras ĉirkaŭ nin ĉie, ĉiutage.

Antaŭe, estis iom da racieco por la skeptikuloj kiuj ne kredis tion kion ili neniam vidis. Sed ne eĉ tiam estis bona preteksto nei aferon sen provante ĝin. La Sankta Skribo insiste diras: "Provu ĉion: eltenadu tion kio estas bona." Tio estas vera libereco. Ni ne

Digitized by Google

kredas la vortojn de alia persono, sed la provadojn de ni mem. Eble, tamen, demando okazos: Kiel ni povos decidi kio estas bona aŭ malbona? Ree la Sankta Skribo respondas: "El iliaj fruktoj vi konos ilin," ĉar "Bona arbo ne povas porti malbonajn fruktojn," "sed putra arbo faras malbonajn fruktojn."

En la ordinaraj aferoj de la vivado ni konstatas tiun ĉi principon. Ekzemple, se iu dubas la utilecon aŭ la praktikon de Esperanto, ni diras al li: "Venu, kaj vidu!" Eble la skeptikuloj ne venos, sed tio ne estas la kulpo de Esperanto, sed de la skeptikeco. Iufoje oni venas al Esperanta kunveno nur pro scivolemo, aŭ eĉ pro malestimo: tiam povas okazi kiel Oliver Goldsmith diras en sia poemo, kie li parolas pri la vilaĝa preĝisto:

"La vero de liaj lipoj en duobla maniero sukcesis,

Stultuloj kiuj venis por moki, ofte por preĝi restis."

En la fruaj tagoj de nia kara lingvo en Bostono, malmultaj el niaj samideanoj unufoje invitiĝis adresi konatan virinan Klubon en tiu ĉi najbareco. Eble 40 aŭ 50 gesinjoroj ĉeestis. Fine sinjoro el la aŭdantaro leviĝis kaj esprimis sin kore kiel ekvarbito: kaj aludante al la versoj de Goldsmith kiujn mi ĵus citis, li aldonis: "Mi konfesas ke mi venis tien ĉi por moki; sed mi restas por preĝi."

Tiu sinjoro estis la filo de la konata William Lloyd Garrison.

Simila estas la devo kaj la privilegio de ĉiu preĝisto de la vero de Dio, ĉu en la vilaĝo aŭ en la urbo. Li diras al ĉiuj, ĉie, ĉiam: "Venu kaj vidu!" Se ili ne venas, ne estas la kulpo de la preĝisto aŭ de la evangelio se ili, ho ve! neniam vidas. Sed se ili venas kun liberaj animoj kaj malfermitaj okuloj, ili vidos multajn glorajn verojn. Ili vidos ke Dio estas La Amo; ke Li estas la Kreinto de ĉiuj homoj, kaj ke Li kreis ilin laŭ Sia propra imaĝo; ke, kvankam "la timo antaŭ Dio estas la komenco de sciado," tamen, "kie ajn la Spirito de Dio ĉeestas, tie estas la (vera) libereco"; ke "nenio povas apartigi nin de la amo de Dio—nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo."

Pro tio, mi insiste kaj kore petas ke, se vi neniam antaŭe venis, vi venu nun. Tiam mi multe esperas ke vi baldaŭ povos diri—ne kiel Julio Cezaro fiere fanfaronis: "Mi venis, mi vidis, mi venkis": sed humile kaj dankeme: "Mi venis, mi vidis, kaj mi venkiĝas."

Ni preĝu.

**La Preĝo de Sankta Krisostomo.**

Ĉiupova Dio, kiu nin permesas nuntempe fari al vi niajn komunajn preĝojn unuanime, kaj promesas, ke kiam du aŭ tri estas kunvenintaj en via nomo, vi plenumos iliajn petojn: plenumu nun la dezirojn kaj petojn de viaj servantoj, kiel estos plej oportune por ili, donante al ni en ĉi tiu mondaĝo la sciadon pri via vero, kaj en la estonta mondo vivon eternan. Amen.

D. O. S. Lowell.

Digitized by Google

## GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

### Sceno de dombrulo en ĥina vilaĝo

Vintra Noktomezo. Subite tra la silenta senhoma strato tondras la averta "tamtamo":—"ban! ban!" Pli rapide, pli kaj pli rapide batas la tamtamo.—Brulo! Brulas la domo No. 4, Norda strato. La tuta vilaĝanaro vekiĝas el la dolĉa dormo kaj salte leviĝas de la litoj. Nature, ĉar en la malgranda vilaĝo ekzistas nek asekur-societo, nek fajrobrigado, nek publika avert-sonorilo, nek bona pumpilo,—la estingado estas tre grava kaj tre malfacila. La reciproka helpo—jen estas la sola rimedo. Do la najbaroj helpas forporti meblaron el la brulantaj aŭ brulontaj domoj. Samcele, por venigi kiel eble plej multe da helpantoj oni "tamtamas." Se, ĉar la vilaĝo iom estas granda, unu tamtamo ne sufiĉas por alvenigi multe da personoj, nepre oni iras diversflanken, tondrigante kelke da tamtamoj. Post kiam la tamtamisto preterpasis vian domon,—malgraŭ la nokta malvarmo, kiu tranĉas la haŭton kaj tremigas la korpon,—vi devas tuj eliri straten kaj pendigi sur via stratpordo ne malpli ol 4 lanternojn, por ke la strato estu lumigita kaj por ke la estingontoj povu sen ia malhelpo rapidi tra la strato. Nepre ĉiu komercisto aŭ riĉulo devas sendi almenaŭ unu serviston por helpi la estingadon. Nepre ĉiu laboristo devas alporti akvon por la pumpilo. Oni tuj elektas kelke da personoj: unu estu "policano," li observu la ordon, alia komandu la pumpistojn k. t. p. La "kasisto" (tiu ofico estas laŭvica) disdonas al la estingantoj-laboristoj specialajn "certigilojn"..Sed jam fine la fajro estas estingita; oni revenas hejmen kaj la stratoj ree dezertiĝas. Morgaŭ, la "kasisto," kalkulinte la elspezojn, kolektas la necesan monsumon ĉe la komercistoj, kiuj hieraŭ ne partoprenis la estingadon, kaj la monon li disdonas al la laboristoj, kiuj helpis la estingadon. Oni ricevas la monon interŝanĝe kontraŭ la "certigiloj"; kiu havas la certigilon, ricevas de la kasisto la rekompencon por sia laborado kontraŭ la minacinta fajro. Jen la kasisto finis sian devon kaj li transdonas sian oficon al la alia, laŭvice sekvanta persono, kiu dum la venonta brulado faros ĉion: disdonos la certigilojn kaj poste pagos al la estingintoj.

—K. Ĉ. Ŝan.

### Japana Fabelo

Maljuna rato havis filinon. Tiu volis edzinigi ŝin kun iu plej forta en la mondo. Ĝi unue iris al la luno, pensante, ke la luno estas la plej forta en la mondo. Sed la luno diris: "min tre ofte malhelpas la nubo, kaj mi neniel povas forpeli ĝin."

Tiam ĝi sin turnis al la nubo, pensante, ke la nubo estas pli forta ol la luno. Sed la nubo diris: "min ĉiam dispelas la vento, kaj mi neniam povas al ĝi kontraŭstari."

Trie ĝi iris al la vento, pensante, ke la vento estas pli forta ol la nubo. Sed la vento diris: "la muro staras kontraŭ mi, kaj mi tute ne povas trapasi ĝin."

Fine ĝi iris al la muro, pensante, ke la muro estas pli forta ol la vento. Sed la muro ankaŭ diris: "via familio ĉiam min mordadas, kaj mi ne povas tion haltigi."

Jen ĝi komprenis, ke la ratino nur devas edziniĝi kun rato, kaj reveninte hejmen, ĝi edzinigis sian filinon kun juna rato de sia najbaraĵo.

—K. Kajiwara.

Digitized by Google

## FOR THE STUDENT

### Fire Scene in a Chinese Village

A winter midnight. Suddenly thru the silent deserted street thunders the warning "tom-tom":—"Ban! ban!" More rapidly, more and more rapidly beats the tom-tom.—Fire! It is at No. 4 North St., The whole village is aroused from sweet sleep and jumps out of bed. Naturally, for in the small village there is neither insurance company, nor fire-brigade, nor public alarm-bell, nor a good pump,—so extinguishing is very important, and very difficult. Mutual help—that is the only means. So the neighbors help carry out furniture from the burning houses and those about to burn. To the same end, to fetch as many helpers as possible, the tom-tom is beaten. If, because the village is rather large, one tom-tom is not enough to fetch up many persons, it is necessary to go to various quarters and sound several tom-toms. After the tom-tom man has passed your house,—in spite of the night cold that pierces the skin and puts you all in a tremble, you must at once go out on the street and hang on your street door not less than four lanterns, that the street may be illuminated and so the fire-fighters may be able to hurry thru the street without any hindrance. Every business man or rich person must without fail send at least one of his servants to help in putting out the fire. Every coolie must without fail fetch water for the pump. Choice is at once made of several persons—one for "policeman" (to keep order), another to command the pumpers, etc. The "treasurer" (this office is held by turns) distributes to the fire-fighting coolies special "certificates."—But now at last the fire is extinguished; people return home, and the streets are again deserted. In the morning the "treasurer," after counting up the expenses, collects the necessary fund from the business men, who yesterday took no part in putting out the fire, and the money he distributes to the coolies who helped put it out. The money is received in exchange for the "certificates": the one having the certificate receives from the treasurer the reward for his work against the erstwhile threatening fire. Now the treasurer has finished his duty, and he transfers his office to the party whose turn is next, who will do the job at the next fire—distribute the certificates and pay the fire-fighters.

By a Chinese.

### A Japanese Fairy Tale

An old rat had a daughter. The former wished to marry her to the strongest individual in the world. It went first to the moon, thinking that the moon was the strongest thing in the world. But the moon said: "I am often hindered by the cloud, and I can in no way drive it away."

Then it betook itself to the cloud, thinking that the cloud was stronger than the moon. But the cloud said, "I am always driven about by the wind, and I can never resist it."

Third, it went to the wind, thinking that the wind was stronger than the cloud. But the wind said, "The wall stands against me, and I can't pass thru it at all."

Digitized by Google

Finally it went to the wall, thinking that the wall was stronger than the wind. But the wall too said, "Your family is forever gnawing at me, and I can't put a stop to it."

Then it realized that the she-rat must only marry a he-rat, and returning home it married its daughter to a young rat in the neighborhood.

By a Japanese.

## NOTES

The above selections by Oriental Esperantists are taken from Esperanta Krestomatio, published in Russia. Notice how the style of a good Mongolian writer differs in no perceptible way from that of his Caucasian brethren.

**batas**: this intransitive use of the verb is entirely classical (cp. F. K. 429, Ham. 174, Rab. 110, etc.).—**tamtamo** is one of our new "official" words, belonging to the Dua Aldono to Universala Vortaro. Acc. to Kabe it is "hina instrumento muzika, konsistanta el metala disko, vertikale pendigita, kiun oni batas per bastoneto," but the writer of these notes recollects that the tom-toms of India, at least, are drums.—Dist. **brulo** from **fajro**: we use the same Eng. word for both, but **brulo** is really the result of **fajro**.—**vilaĝanaro**: a collective noun without Eng. equivalent.—**salte leviĝas**: a "Kabeism" (cp. Fum. de Op. 9, Lasta 16, Elek. Fab. 190 etc.)—**Ekzistas**: in good Esperanto **esti** is almost purely a "copulative" (connecting two nouns or a noun with an adjective; it is rarely used in the sense of "existence" (as in Eng. sentences beginning: "there is" or "there are"), being in such case almost invariably replaced by some other verb, e. g. **ekzisti, sin trovi, kuŝi, stari** etc.—**brulantaj**.... **brulontaj**: the use of participles in this selection is masterly, and should be carefully noted.—**Samcele**: on previous occasions we have noted the propensity in good Esperanto for compressing expression in a single adverb (which must be rendered in Eng. by a cumbrous phrase or even clause),—**preterpasis**: "has passed" (a crude writer would have used the compound **estas preterpasinta.)** Cp. **finis** "has finished," last sentence below.—**malvarmo, kiu trancas la haŭton** (cp. **La malvarmo estas tranĉa,** F. K. 404).—**lumigita**: dist. **ilumini,** which relates only to festal illumination (Kabe's definition, F. K. 373).—**estingontoj**: lower down we have **estingantoj,** and finally **estingintoj**: no modern national tongue could express these distictions so succinctly: with its six participial endings, Esperanto has a system comparable for expressiveness only with that of ancient Greek.—**komandu**: to be dist. from **ordoni**: **ordonoj** are the natural sequence from a position of **komando.**—**estingantoj-laboristoj**: note the dist. between **-ant-** and **-ist-** even with reference to the same parties: the coolies were professional "laborers" (-ist-), but only amateur "extinguishers" (**-ant-**).—**interŝanĝe kontraŭ**: this use of **kontraŭ** is quite common in commercial Esp.—**minacinta**: notice the compact expressiveness of the participle.—**brulado**: cp. **brulo** above. Here the work to be done during the **continuance** (**-ad-**) of the fire is uppermost in mind.

Digitized by Google

**"min....malhelpas la nubo"**; lower, **"min....dispelas la vento"**; such inversions are best rendered by the passive in English.—**kontraŭstari:** the new root **rezisti,** tho used by such writers as Sam. Meyer and Verax, has not yet been "officialized."—**mordadas: mordi** = "to bite," **mordadi= "to keep on biting,"** i. e. "to gnaw."

This last selection, tho called **fabelo,** has more the characteristics of a **fablo,** even to the moral.

H. M. S.

---

## BEST TRANSLATION

### S-ino Curie

Ŝi estas la virino, kiu fordonis la tuton da sia altvalora eltrovaĵo al la hospitaloj kaj la kuracilfarejoj, kaj mem nun posedas nek iom nek la rimedojn por* aĉeti iom; tiu, kiu ekzistas per salajro de instruistino en Francio kaj ne havis iom da karbo por hejti siajn ĉambrojn la pasintan vintron—pro malriĉeco.

"Mi donis la sekreton al la mondo. Tio ne okazis* por riĉigi iun. Ĝi estis* por la tuta homaro." Jen ŝi estas*; la apoteozo de kreema scienco.

Nun* la kontrasto: La saman tagon kiam ŝi alteriĝas en Nov-Jorko kun anonco, ke ŝia altvalora eltrovaĵo estas vivsavilo, ni legas rakonton el Vaŝingtono. Ŝajnas, ke oni evoluigis novajn mortigajn seriojn* de sciencaj produktaĵoj; kaj la Militfako* kunagas kun la Militŝiparfako, intencante eksperimenti per ili en junio.

Estas* brombenzilcianido—nova larmgaso, kiu tuj blindigus* virojn por la tuta vivo. Ankaŭ difenilkloraseno—nova venena fumo, kiu mortsufokus* virojn en momento. Kaj estas* venena polvo—kiu bloviĝus per la ventoj kaj rapidege detruus* ĉiom da vivo. "Rezulte de tiuj ĉi eltrovaĵoj," laŭ la depeŝo, "estus necese, ke ŝipoj estu nepenetreblaj per aero, por ke la ŝipanaroj evitu detruadon."

Jen perfekta portreto de sciencospeco, kiu subteniĝas per subvencioj de registaroj.

[Demando: Kial sciencistoj amerikaj ne havas tempon por lerni Esperanton?]

Tradukis D. M. Lynds, 3008 Mabel St., Berkeley, Cal.

*Noto de Red.—Ĉar la tradukado de la junia ekzerco ŝajnas senerara, ni kuraĝas iom dube pritrakti stilajn demandojn. "por"—nenecesa post "rimedojn"; forlasu. "okazis"— prefere uzu "fariĝis" pro la homa intenco; same anstataŭ "estis." "Estas"—vidu noton de Red. Scott sub Gem; anstataŭu per "staras," "jen," "troviĝas," k. t. p. "Nun"—prefere ne uzu se oni ne celas tempan rilaton; uzu "nu." "Seriojn"—estas tute ĝusta kiel teknika termino (Verax), tamen ĉe populara uzado ĝi signifas sekvado laŭ "Indian file," kaj "aro" sufiĉas. "Fako de Milit(ŝipar)o"—mi preferas pro la longeco de la vortoj kaj pro la ĉefliteroj. "Blindigus"; k. t. p..—"blindigas," ĉar blindigpovo estas konstanta, ne kondiĉa povo de la gaso.

Digitized by Google

## RESPONDO AL DEMANDO

American scientists are busy people, but they have time to learn anything which they consider to be of prime importance.

The great majority of them do not learn Esperanto, simply because they are not thoroughly convinced of its utility.*

However, since scientific knowledge increases by research and experimentation carried on in various parts of the world, and the scientists in one country properly wish to receive prompt and accurate information in regard to the results of such processes in other countries, it would seem that an international language should be peculiarly convenient and useful to this class of persons.

D. M. Lynds,
3008 Mabel St., Berkeley, Cal.

* Is it that they are convinced of the "utility" of the poison gases? or is it heedlessness or carelessness? Have scientists no responsibility to investigate and set up on this earth a remedy for war? The question was addressed, as was the entire number, primarily to the scientists themselves, more especially to those not giving consideration to or opposing Esperanto. It lies largely within the power of the scientists of America to dissuade or persuade public opinion to accept Esperanto. —N. W. Frost.

---

## TO TRANSLATE

### THE ARTIST'S SECRET

By Olive Schreiner

There was an artist once, and he painted a picture. Other artists had colors richer and rarer, and painted more notable pictures. He painted his with one color, there was a wonderful red glow on it; and the people went up and down, saying, "We like the picture, we like the glow."

The other artists came and said, "Where does he get his color from?" they asked him; and he smiled and said, "I cannot tell you"; and worked on with his head bent low.

And one went to the far east and bought costly pigments, and made a rare color and painted; but after a time the picture faded. Another read in the old books and made a color rich and rare, but when he put it on the picture it was dead.

But the artist painted on. Always the work got redder and redder, and the artist grew whiter and whiter. At last one day they found him dead before his picture, and they took him up to bury him. The other men looked about in all the pots and crucibles, but they found nothing they had not.

And when they undressed him to put his grave-clothes on him, they found above his left breast the mark of a wound—it was an old, old wound, that must have been there all his life, for the edges were old and hardened; but Death, who seals all things, had drawn the edges together and closed it up.

Digitized by Google

And they buried him. And still the people went about saying, "Where did he find his color from?"

And it came to pass that after a while the artist was forgotten—but the work lived.

## LINGVAJ NOTOJ

Petskribo de Asociestroj Warden, Rollet de l' Isle, kaj Witteryck proponas la forlason de ambaŭ -io kaj -ujo kaj uzadon de -lando.

Le Monde Esperantiste, marta-aprila, enhavas notindan artikolon franclingvan kontraŭ la pliigo de nia vortaro.

Esperanto Finnlando proponas forlason de ĥ. [Ĉu necese? Ni preferus uzadon de "hj" anstataŭ "k"; ekz. ehjo, monahjo, k.t.p.—Prujno.]

En La Espero recenzanto klarigas ke bovoviro ne estas virbovo, sed homa(?) viro kun bovaj ecoj. [Ni konsentas al la fakto en aktuala Esperanto, sed se vir- estas afikso kaj aparta radiko kun konstanta signifo—vidu argumentojn de Akademio—ĉu ni ne povas imagi nehoman viron?—Prujno.]

## SEKRETARIA RAPORTO POR E. A. N. A.

Laŭ miaj vortoj ĉe la kunsidoj de la Kongreso en Bostono—unue ĉe la ĝenerala, poste ĉe la du spertularaj kunsidoj,—mi plivolas raporti pri farindaĵoj ol faritaĵoj. Fakte, la faritaĵoj estis plejmultege tiuj de la helpsekretariino; ĉar, laŭ mia diro, kiam oni elektproponis min lastan jaron en Novjorko, mi ne havis la tempon por esti pli ol nominala sekretario. Dum kelkaj monatoj mi prilaboris la "Cerbumejon"; sed antaŭe la printempon, mi trovis ke la afero kostis tro multe da tempo kompare kun la intereso elmontrita pri ĝi. Ankaŭ mi ne ĉiam povis havi sufiĉe da spaco en A. E. por doni la tutan diskutadon, kaj iufoje neniam da spaco. Tial, mi prokrastis la Cerbumejon ĝis post la 1921-a Kongreso, nun esperante publikigi rekomendojn pri daŭrigo de tiu fako en baldaŭa numero de A. E.; speciale se mi ricevos kuraĝigajn komunikojn de interesituloj.

Nu, por la (laŭ mia opinio) farindaĵoj, jen:

1. Laŭ spertoj en Bostono, mi urĝas ke oni uzu la Esperantan lingvon pri grup- kaj kongres-aferoj, escepte rilate propagandadon inter neesperantistoj kaj apud komencantoj antaŭ ol tiuj havos kelkajn lecionojn; kvankam mi estas necerta ke mi ne rekomendus "tute esperante" eĉ ĉe la komenco de la klaso. Mi kredas ke nia movado multe suferis pro tio, ke oni tro parolis sian nacian lingvon. Bostone, ni, havante la centrejon de la Asocio, tentiĝis paroli pri oficialaj aferoj en la angla lingvo, kio tedegas la "eksterulojn," kaj la neestraron de E. A. N. A. Post diskutado de tiu propono, ĉe la spertulara kunsido, voĉdonis 8 por mia propono, 5 kontraŭ; la plimulto ne voĉdonis. (Mi ŝatus legi kion la mondesperantistaro rekomendus rilate mian proponon.)

2. Ŝajnas al mi, ke ni bezonas disvastigi la respondecon por nia movado inter la "multaj"; kaj ke ni povas fari tion per la propono ke la membraro de E. A. N. A. akceptu specialaĵojn pri kiuj ĉiu laborados

Digitized by Google

stude, age, pense, skribe, parole, sonĝe, tage kaj nokte. Ekzempligante, mi antaŭmetas liston de (miaopinie) prilaborindaĵoj kaj sugestas nomojn de samideanoj kiuj, inter multaj aliaj, povus, profitige je nia movado, akcepti tiun ĉi ĝentilan oficon, elfari statistikon, metodon, studadon, raporton, k.t.p., laŭ la naturo de la temo, rilate unu el la listitaĵoj, aŭ alia pli inda. Tial la oficaĵoj:

1. Uzoj de Esperanto.
2. Esperanto en la lernejoj.
3. Prinotita listo de lernolibroj.
4. Elĉerpaĵa folietaro.
5. Bonaj metodoj por grupkondukado.
6. Esperanto inter la blinduloj.
7. Landkarto montranta kie ekzistas Esperantaj reprezentantoj.
8. Sugestioj por la 1922-a kongreso.
9. Centra kaj ĉiamkreska katalogo de Esperantaj aferoj.
10. Esperanto en kaj por la bibliotekoj.
11. Esperanto je la knabskoltoj.
12. Indekso al Amerika Esperantisto de la komenco (1906).
13. Lingvaj studoj kun kolekto por spertula gramatiko.
14. Rekomendita listo de legolibroj, kaj alia literaturo.
15. Propaganda materialo.
16. Legado de gazetoj, po unu por ĉiu, por ke entute ni posedu resumon de la monda Esperanta gazetaro, kaj per tio riĉigi nian A. E.

Por nomoj de samideanoj, estas multegaj; sed, se la subaj dek skribos al mi ke ĝoje ili akceptos prilaboradon koncerne iu ajn el la supraj aŭ io alia, mi opinias ke facile mi havigos la voĉdonon de nia prezidanto kaj la aga komitato rilate la oficialigon de la afero. Tial la nomoj:

I. F-ino Butler.
II. Juĝisto Daingerfield.
III. S-ro Fisher.
IV. S-ro Hailman.
V. S-ro Hetzel.
VI. S-ino Horn.
VII. D-ro Lowell.
VIII. S-ro Payson.
IX. S-ro Silbernik.
X. F-ino Stoeppler.

Se tiu propono efektiviĝos, mi kredas ke ĉe nia jara kunveno ni havos tre interesajn diskutadojn kaj atingos gravan farindaĵaron por la E. A. N. A. Notu, ke mi nomis dekses temojn kaj nur dek samideanojn. Tio signifas ke mi invitas ĉiun membron de nia Asocio skribi al mi pri kiu ajn temo li volus labori, kiel helpanto de la prospero de nia internacia lingvo. G. W. Lee, Sek. E. A. N. A.

Ni tute simpatias kun tiu propono de S-ro Lee rilate la disvastigon de la laboro de la asocio por ĝia pli bona elfaro, kaj por utiligi la kapablojn de la diversaj spertuloj. Tre ofte ni plendis ke tezoj ekz. propagandaj aŭ specialaj devas esti verkata de redaktoro sen kunhelpo de kompetentuloj tiufakaj.

La gazetojn, krom tiuj de lingvoj ne-Eŭropanaj, pro tempaj necesoj redaktoro mem tralegas kaj iliajn novaĵojn perantas al la legantoj de A. E., sed kompreneble tion povus fari pli plene kaj malpli pene multelingva grupo de samideanoj kiel ekzemple la grupo Harmonio en New York kaj redaktoro tie. Legado de malproksimaj izoluloj estus sendube bona metodo starigi oficejan indekson de ĉiu gazeto sed tute ne taŭgus por A. E. —Prujno.

Digitized by Google

## KRONIKO AMERIKA

**Eliot, Maine**—S-ino Gregory instruas klason de Bahajanoj je Green Acre. Ofte vizitas Sek. Lee kaj la festtagon, sep. 3, vizitas kelkaj kromaj Bostonanoj.
**Boston, Mass.**—Post la kongreso ni ĝuis vizitojn de Robert Frost el Montpelier kaj F-ino Terk el Montreal. Klaso funkcias, gvidata de S-ro Lee.
**Washington, D. C.**—S-ro B. P. Mann anoncas senpagajn lecionojn de septembro ĝis majo ĉiuvendrede je la sepa kaj duono.

---

## WORLD NEWS OF ESPERANTO

We regret that owing to the non-receipt of our looked-for exchanges we are unable to present in this number a full account of the Congress at Praha. Here are, however, a few statistics compiled some weeks before the congress opened:

Ĉiuj kvin partoj de la terglobo estos reprezentataj kiel oni vidas el jena tabelo:

2175 kongresanoj el 24 landoj de Eŭropo, 13 el 5 landoj de Ameriko, 4 el 2 landoj de Azio, 2 el 2 landoj de Afriko, 3 el 1 lando de Aŭstralio, entute 2197 kongresanoj el 34 landoj de 5 mondpartoj.

La vico da landoj laŭ la nombro de aliĝintoj estas jena:

1. Ĉeĥoslovakio 1186 — 2. Germanio 239 — 3. Svedio 111 — 4. Francio 83—5. Aŭstrio 70—6. Nederlando 70—7. Britio 68—8. Polio 62—9. Danio 45—10. Italio 41—11. Magiario 40—12. Svisio 34—13. Bulgario 30—14. Hispanio 25—15. Belgio 13—16. Jugoslavio 12—17. Norvegio 12—18. Finnlando 11—19. Rumanio 9—20. Ukrainio 5—21. Dancigo 4—22. Usono 4—23. Argentino 4—24. Kanado 3 — 25. Aŭstralio 3—26. Rusio 2—27. Litovio 2—28. Japanio 2—29. Turkio 2—30. Estonio 1—31. Brazilio 1—32. Urugvajo 1—33. Alĝerio 1 — 34. Sudafriko 1.

Ankaŭ la statistiko laŭ profesio ne estas kompleta. Ni povas provizore sciigi jenajn interesajn ciferojn. Inter aliĝintoj estas:

1. Oficistoj 356—2. Instruistoj 201—3. Metiistoj 189—4. Komercistoj 126 — 5. Studentoj 103—6. Profesoroj 36—7. Inĝenieroj 30—8. Advokatoj 22—9. Kuracistoj 19—10. Ĵurnalistoj 14— 11. Artistoj 12—12. Pastroj 10—13. Diversaj profesioj 103—14. Sen definita prof. 215.

In Nuremburg, Germany, since April, 80 postmen have been studying Esperanto in 4 courses; also 92 railroad men have applied for the courses to begin Sept. 1.

In Irkutsk, Siberia, 173 joined the Esperanto courses beginning in January, 1921.

Nuremburg, Germany, has decided to have Esperanto taught as an elective study in the upper classes of the advanced trade schools and girls' high schools. The neighboring town of Furth has also put it in their advanced trade schools.

In Offenbach, Germany, the schools have introduced elective courses in Esperanto, the city buying the textbooks and paying the teachers. Twelve courses with some 350 students have begun.

Digitized by Google

Some idea of the rapid progress of Esperanto may be gained from the statistics of E. Laboristo and E. Triumfonta, both of which are now issuing and selling editions of 2500 or over and are on a firm financial basis.

The Locarne, Switzerland, school authorities have decided to open official paid courses in the local evening schools.

The Dresden Sub-Congress was attended by 24 nations. It was there announced that the League of Nations had officially delegated Dr. Nitobe, its vice president, to the Praha Congress.

The Finnish Esperantists enjoyed a real international gathering at Tallin, Esthonia, with the local society "Espero"—250 members—as hosts.

The Bulgarian parliament has adopted the bill of the Ministry of Public Instruction introducing Esperanto as an elective study in Bulgarian high schools for the year 1921-22.

Espero Katolika proposes a return to the old organization and aim "for Esperanto among Catholics" instead of confining the movement to the aim adopted by "Ika" at the Hague, "for Catholicism among Esperantists."

The Third All-Russian Esperanto Congress met June 1-5. It included 163 delegates, of 13 nationalities from 73 cities. Eski, the Communist branch society proposed the use of Esperanto to support the soviet government which was voted.

All reports showed great advances of the Esperanto movement thruout Russia.

"After the reports two resolutions were presented which aroused long and heated debate. Decision was postponed until the work of the Resolutions Committee was completed. This was only on the third day, after long factional sessions and the breakup of the federalist faction—many of whom agreed to the resolution of the Communist group; some members, led by Futerfas, protesting loudly, withdrew from the congress—whereupon the congress by a large majority adopted the resolutions proposed by the Communist faction:

"......that the IIIrd All-Russian Esperantist Congress declares that the basic task of the Russian Esperantist movement is at all times to render support to the Soviet government by the auxiliary language Esperanto and to give assistance with it as a medium in business and in interstate affairs.

"that the Congress recognizes as the very best form of the Esperanto movement the organization of Esperanto sections and courses among all sorts of workers, professional and culture-enlightenment organizations of the Republic."

Trans. from Agitanto, pk. 918, Kronstadt, Russia.

We have received a highly interesting number of Bizantio, Impasse Saverio 55b, Sichane, Karakol, Constantinople, an illustrated monthly in parallel Greek and Esperanto with a chronicle in Greek and French. A number of notable articles appear in this opening issue, including one on the medical operation of extracting a leach from a human throat by use of animal psychology.

Digitized by Google

Mr. V. Stopani, the Esperanto enthusiast and teacher of Shanghai, suicided on March 26th. He had made long herculean efforts to advance Esperanto in China. S-ro Kawakami is conducting the course in his stead.

---

## EXECUTIVE COMMITTEE REPORT

New York, N. Y., Aug. 31, 1921.

Fellow-Esperantists:—

Since my previous message, Mr. Frost and Mr. Hetzel have accepted the chairmanships of their respective committees, announced in the preceding issue. Dr. Lowell prefers to be known as **honorary** chairman of the Propaganda Committee, owing to a pressure of duties which will somewhat limit the time which he can devote to the work of this committee. Plans are under way for a distribution of the actual labor, which will guarantee efficiency in carrying it on, while retaining for us the inestimable advantage of Dr. Lowell's guiding hand, but relieving him of many details which can be executed by others.

With many signs of encouragement, our task this year should be to increase the membership of the E. A. N. A., and to place our magazine on a solid foundation, where it will become a financial asset, and not a liability. There are Esperantists and Esperanto students, to say nothing of a multitude of interested friends, in sufficient number on this continent to give both the organizaion and the magazine more than enough support to meet all needs. Let it be our business to overcome the inertia which has kept them aloof, and to convince them that only through their active participation in the organized movement can Esperanto become of full value to them; and that an energetic union of forces is the one indispensable condition to the progress of the cause. We can put Esperanto on the map, and keep it there, if we pull together,* regardless of personal feelings and minor differences of judgment; we can never do so, if we are ready to hold aloof, whenever we cannot have our own way, or when we honestly disapprove of something done by others. As strong individuals, we must expect often to differ, and sometimes to do so with considerable vehemence. This is not unwholesome, provided that we discuss without bitterness, and if outnumbered, accept the situation as one in which to do our best for the principle which is immeasurably bigger than our personalities. If a mistake is made on one occasion, it may be reversed on another, when experience has shown that another course would have been preferable; but the loss of a worker to the cause or to the organization representing it in North America is always a disaster.

Fraternally yours,
James F. Morton, Jr.
Chairman of the Executive Committee.

*It seems to the editor a little doubtful whether the best way to get the magazine into the asset class is by not making an appointment with its editor nor even communicating with him in this regard while in the vicinity. N. W. Frost.

Digitized by Google

## PRESS MENTION

We have received a considerable amount of press mention both in and outside of Boston for which we have to thank chiefly isolated and unrewarded volunteer effort. In order that such work may be more fully utilized, it had been decided to make a permanent collection of clippings or printed articles (or notice of them) referring to Esperanto. This department will be covered by Mr. Marootian of Boston, whether the clippings are sent originally to the Magazine address for notice therein, or to the Central Office, or to the Chairman of the Propaganda Committee. Please let us have all clippings, in all languages, that this may be a valuable work of reference for propaganda.

## EDITORIAL NOTES

We regret that several errors appeared in our account of the congress. In telling of the first spertularo we stated that Mr. Silbernik opposed Mr. Lee's motion. Read Miss Weems. (As we were not present, the slight information given us was expanded with the intent of checking before printing, but this was overlooked.)

The following articles in Boston newspapers escaped citation:—Boston Post, July 12—Esperantists Open Annual Congress; Boston Globe, July 14—Fishing Boat Name, Esperanto, Explained; Boston Herald, July 14—Say Esperanto Grows in Favor.

We do not feel that the laudation of America in the contribution from Spain is fully justified, but we print it to indicate how much the world looks up to America, and how great is our responsibility in such relations as that of the Washington Disarmament Conference.

## OFFICE NOTES

We can furnish a good selection of books and shall keep a full stock of all the books most called for. The list below contains new books as well as some that have been out of stock recently. This list should be added to the partial catalog in the March issue.

| | |
|---|---|
| **Esperanto Teacher,** Fryer | .40 |
| **Esperanto-English Dictionary,** Millidge, cloth | 2.25 |
| **English-Esperanto Dictionary** Fulcher-Long, cloth | 2.00 |
| **Pitman's Commercial Esperanto,** Page, cloth | .75 |
| **Practical Business Letters,** O'Connor & Hugon | .45 |
| **Gregg's Shorthand** | .45 |
| **Enciklopedia Vortareto,** Verax, cloth | 2.50 |
| **Naŭlingva Leksikono,** Bastien | 1.00 |
| **Universala Vortaro,** Zamenhof | .65 |
| **Esperanto Legolibro,** Setala | .50 |
| **Miserere** (Wagnalls) kaj **Thais** (Le France), Payson | .50 |
| **Sinjoro Tadeo,** Mickiewicz, Grabowski | .75 |
| **Tatterley,** Gallon, Wilson | .35 |
| **Vivo de Zamenhof,** Privat paper .75, cloth | 1.25 |
| **La Evangelio laŭ S. Johano,** Lowell-Anderson .10, 12 for | .75 |
| **International Language,** Clark, cloth | .65 |
| **International Language,** in Eng & Esp., Wackrill | .25 |

New Esperanto Buttons, Clasp Pins and Stick Pins, each .50

If you wish for any particular book we will furnish it for you promptly.

Digitized by Google